

# **Jara raporto de la TEJO-estraro kaj -komisiitoj**

**2011/2012**



Tutmonda Esperantista Junulara Organizo  
Nieuwe Binnenweg 176  
3015 BJ Rotterdam  
Nederlando

[www.tejo.org](http://www.tejo.org)

Kompilita de Paweł Fischer-Kotowski  
Varsovio, la 25-a de julio 2012

## Enhavo

Enkonduko

1. Administrado
2. Kunordigado kaj homaj rimedoj
3. Financoj
4. Landa agado
5. Informado
6. Eksteraj rilatoj
7. Edukado
8. Kongresoj
9. Aktivula trejnado kaj seminarioj
10. Volontulo
11. Oficisto
12. Komitato de UEA
13. Reta agado
14. Pasporta Servo
15. Adoleska agado
16. TEJO-aktuale
17. TEJO tutmonde
18. Kontakto
19. Mallongigoj

## Enkonduko

Tiu ĉi raporto prezentas la laboron de TEJO en la lasta jaro, do ekde la IJK 2011 en Kievo, Ukrainio, ĝis la IJK 2012 en Hanojo, Vjetnamio. Ni komencis tiun jaron per elekto de la okkapa estraro en kiu dume okazis kelkaj ŝanĝoj. Aprile demisiis kasisto, Alisa Nikitina. Ŝiajn taskojn transprenis Nico Hurrman, tria vicprezidanto kiu ĝis tiam respondecis pri seminarioj kaj aktivula trejnado, kaj lian kampon, kiel komisiito transprenis Przemysław Wierzbowski. Maje okazis ŝanĝo en ofico de ĝenerala sekretario. Demisiintan Paulína Kožuchová anstataŭis Paweł Fischer-Kotowski. Ceteraj estraranoj laboras sen ŝanĝoj en siaj postenoj, t.e.: Sergey-Meiyer Tyrin (unua vicprezidanto, informado), Michael Boris Mandirola (dua vicprezidanto, eksteraj rilatoj), Tina Tišljár (kongresoj), Petra Smidéliusz (landa agado, edukado). Nuntempe do ni havas seskapan estraron kaj krome la agantan ĝeneralan sekretarion kun propono al la Komitato alelekti lin kiel estraron dum la IJK en Hanojo.

En tiu ĉi periodo okazis du fizikaj kunvenoj de la tuta Estraro (septembre 2011 en Roterdamo kaj aprile 2012 en Varsovio) kaj dek kvar retaj kunvenoj. Inter la plej gravaj aferoj okazintaj ĉi-jare estis sendube reformo de la regularo kaj reglamentoj, unuaj elektoj de komitatanoj B ekde 10 jaroj, Pasporta Servo, pri kies sorto la komitato decidis maje, plibonigo de komunikado inter la Estraro kaj membraro, intensigo de nia ĉeesto en eksteresperantaj medioj, preparo de subvencipeto por seminario kun AEGEE, organizado de IJK en nova, subite ŝanĝita gastiga lando, iniciato reaktivigi la Artistan Datumbazon kaj aliĝo de la nova landa sekcio en Meksiko. Tamen pli detale Vi povas konatiĝi kun ĉi ĉio en la ceteraj, pritemaj eroj de la raporto. Mi deziras al Vi bonan legadon!

Łukasz Żebrowski  
Prezidanto de TEJO

## Administrado

raportas Paweł Fischer-Kotowski, aganta ĝenerala sekretario

En la 67-a Internacia Junulara Kongreso, kiu okazis inter la 14-a kaj 21-a de julio 2011 en Kievo, la Komitato de TEJO elektis por la dujara oficperiodo la novan Estraron: Łukasz Żebrowski (prezidanto), Paulína Kožuchová (ĝenerala sekretario), Alisa Nikitina (kasisto), Sergio Tyrin (unua vicprezidanto, informado), Michael Boris Mandirola (dua vicprezidanto, eksteraj rilatoj), Nico Hurrman (tria vicprezidanto, aktivula trejnado), Petra Smidéliusz (landa agado kaj edukado), Tina Tišljár (kongresoj).

En aprilo 2012 demisiis Alisa Nikitina kaj la taskojn de kasisto transprenis Nico Hurrman, dum por lia ĝistiam laborkampoj estis nomumita nova komisiito, Przemysław Wierzbowski. Post unu monato demisiis plia estrarano, Paulína Kožuchová. Ŝiajn taskojn preskaŭ tuj transprenis Paweł Fischer-Kotowski, nomumita de la Estraro kiel aganta ĝenerala sekretario. Laŭ la estrara propono, la Komitato voĉdonos pri lia estraraniĝo en la kunveno okazonta kadre de la 68-a IJK en Hanojo.

Kiel en kutima jaro, inter la du IJK okazis du estraraj kunsidoj – en Roterdamo (septembro 2011) kaj Varsovio (aprilo 2012). Krome, en ĉiuj aliaj monatoj okazis reta kunsido, dum kiu oni traktis aktualajn temojn kaj planis plej proksimajn agadojn. En decembro 2011 okazis

ankaŭ eksterordinara kunveno de la Komitato, kiu kunsidis en Gdansko kadre de la Junulara E-Semajno kaj alprenis decidojn pri la rekomendo al la Komitato de UEA ŝanĝi la regularon pri TEJO kaj pri la ŝanĝo de la reglamentoj.

En junio 2012 komenciĝis la nova dujara oficperiodo de la Komitato de TEJO. Por la komitataneco B sin kandidatigis sep kandidatoj por kvar lokoj, tial la unuan fojon ekde dek jaroj okazis poŝta voĉdonado inter la individuaj membroj. Al la Centra Oficejo revenis entute 32 validaj voĉdoniloj. Oni elektis la jenajn komitatanoj B: Paweł Fischer-Kotowski (21 voĉoj), Wang Shanshan (20), Ronald Baby González (18) kaj Magnus Henoch (16). La Komitaton konsistigas nun 21 komitatanoj A, 4 komitatanoj B kaj 6 estraranoj.

Krom la jam menciita Przemysław Wierzbowski, kiu ekde aprilo 2012 respondecas pri la aktivula trejnado, la Estraro nomumis ankaŭ du pliajn novajn komisiitojn: Szabolcs Szilva, kiu ekde februaro 2012 estas redaktoro de *TEJO tutmonde* kaj Rogener Pavinski, kiu ekde julio 2012 respondecas en TEJO pri la kultura kampo.

La volontulon, kiu ekde aŭgusto 2011 estis Sébastien Denux elpostenigis la Estraro kaj en februaro 2012 anstataŭigis lin Natalia Antolak. En aŭgusto aŭ septembro 2012 ekoficos la nova voluntulo, Quentin Weber-Seban, por kiu oni antaŭvidas unujaran oficperiodon. La voluntulo estas ekde novembro 2011 helpata de la oficisto – tute nova posteno en TEJO; la unua oficisto estas Manuela Ronco.

La estraranoj, komitatanoj, komisiitoj, voluntulo kaj oficisto raportis pri siaj agadoj en la ĉiumonata cirkulero, kiun kunmetas la ĝenerala sekretario. Ĉiuj arkivaj numeroj de la cirkulero estas konsulteblaj en la TEJO-vikio (<http://www.tejo.org/vikio>).

## **Kunordigado kaj homaj rimedoj**

raportas Łukasz Żebrowski, prezidanto

Kadre de la estrara laboro jam faritaj estas du paŝoj por raciigi uzon de labortempo. Retaj estrarkunsidoj okazas iom pli ofte ol estis antaŭe, nome okazas kutimaj ĉiumonataj renkontiĝoj kaj krome okazas pliaj eksterordinaraj por trakti konkretajn aferojn. En la fizikaj kunsidoj signife pli multe ni laboras en grupoj. Tio permesas al ni ŝpari multon da tempo kaj konsekvence labori pli efike. Dum la lasta kunsido estis jam pli ol duono de labortempo en grupoj – espereble en ontaj estos eĉ pli. Krome estas ankoraŭ unu jam progresanta afero. Temas pri la interna estrara sistemo por superrigardi plenumadon de taskoj. Kune kun ĝenerala sekretario mi nuntempe elprovas iujn sistemojn por proponi iun al la Estraro, plej verŝajne en septembro.

En la Komitato la ĉefa ŝanĝo estas deviga partopreno en minimume unu komisiono. Tio ĉi komenciĝas nun, kune kun inaŭguro de la nova Komitato – ĉiu komitatano povas membriĝi en komisionoj pri adoleska agado, aktivula trejnado, eksteraj rilatoj, informado, kulturo, Pasporta Servo, landa agado (kun subkomisionoj laŭ regionoj). Ni esperas ke el tio rezultos plia enaĝiĝo de la komitatanoj al TEJO-agado. Efikojn de tiu decido ni espereble povos pritaksi en la venontjara jarraporto.

Rilate al ĝenerala homrimeda politiko koncernanta tutan mebraron de TEJO, estas nun tre progresitaj du projektoj. Unua el ili estas datumbazo de aktivuloj. Temas pri projekto ekigita en IJK 2011 en Kievo. Ĝi estos interna datumbazo de la TEJO-aktivuloj serĉeblaj laŭ iliaj

kompetentoj. Pri ĝia programado laboras Clemens Fries. Alia projekto estas kunlaboranoncoj en tejo.org, iom similaj al la laboranoncoj en HR-partoj en paĝaroj de diversaj kompanioj. Tie aktivuloj povos rapide trarigardi kiuj homoj estas momente plej serĉataj kaj sinproponi. Ambaŭ projektoj jam havas siajn provversiojn. La datumbazo bezonas ankoraŭ aspektigon kaj kelkajn plibonigojn, la anoncoj ĉefe nur plenumon per enhavo. Ambaŭ projektoj aperos rete, kiel nova ero en tejo.org, plej verŝajne aŭguste aŭ septembre, do post aktualigo de Drupalo tie.

## Financoj

raportas Nico Huurman, tria vicprezidanto kaj kasisto

Dum la financa jaro 2011 okazis ŝanĝo de la estraro. Dum ĝia unua duono Sergeo Tyirin estis la kasisto kaj post la IJK en Kievo, Alisa Nikitina transprenis la postenon. Post ŝia demisio mi transprenis la respondecon pri la financoj fine de marto 2012. Tio signifas ke mi ĉi tie devas raporti pri financa jaro kiun mi mem ne traktis dum la jaro, nur poste renkontis ĝin dum la fintraktado kaj fermo de la kontoj. Mi do preferas ne tro detale ĉi tie raporti pri la financaj detaloj, en aparta raporto vi povas trovi la jarkalkulon kaj bilancon por 2011 kun kelkaj klarigoj.

Mi do konzice raportos pri la transpreno de la taskoj antaŭ kelkaj monatoj. Mi konstatis ke regas iom de malklareco pri la preciza taskodivido inter la kasisto de TEJO kaj la kontistoj de la Centra Oficejo en Roterdamo. Ili faras ĉiun praktikan laboron de ĝirado kaj librotenado, integrita en la sistemo de UEA. Por fari la finkalkulojn pri la financa jaro, mi do dependis de iliaj informoj, kiuj komence venis en tre malfacile prilaborebla formato. Poste feliĉe ni trovis solvon por tio. Due mi devas konfesi ke mi apenaŭ ricevis helpon pri la transdono flanke de Alisa Nikitina, sed ĉi tiun mankon tre adekvate plenigis Sergey Tyirin, estinta kasisto ĝis mezo de 2011.

## Landa agado

raportas Petra Smidéliusz, estrarano pri landa agado kaj edukado

La ĝenerala stato estas bona.

Mi okupiĝis/okupiĝas pri la jenaj aferoj:

- kontaktado de ĉiu LS kaj konstanta ĝisdatigado de la informoj pri ili en la koncernaj vikioj
- prezentado de la LS-oj en la TEJO-retejo (duonpreta, mankas la kontribuaĵo de multaj LS-j)
- KODEJO 2011 (bedaŭrinde signife malpli da LS-j partoprenis ĉi-jare)

Miaj planoj por la estonteco:

- fari kalendaron pri la junularaj eventoj por la TEJO-retejo
- elfunkciigi la komisionojn pri la landa agado kaj poste helpi ilian laboron

Mi pensas ke la ĉefa problemo kiu malhelpas mian laboron estas la ĝenerala malaktiveco de la LS-representantoj, multfoje neniu reago venas al miaj petoj.

## KODEJO 2011

Ĉi-jare la enketon partoprenis 24 landaj sekcioj de TEJO, signife malpli ol pasintjare. Estas kontentige ke la plimulto de la respondintaj asocioj taksas sin aktivaj. Rilate la financon situacion de la organizoj, triono de ili skribas ke ili ne havas propran financon, dum la aliaj ĉefe raportas pri kontentiga financa situacio, nur du asocioj plendas pri seriozaj problemoj. Evidentiĝis ankaŭ tio, ke la asocioj havas diversajn kutimojn kiel aŭ ĉu entute pagigi siajn membrojn, en kelkaj organizoj tute ne estas membrokuto, dum en aliaj asocioj pagas nur kelkaj membroj, kaj estas ankaŭ landaj sekcioj, kie ĉiu pagas.

Laŭ la respondoj, multaj asocioj kutimas varbi novajn membrojn en universitatoj kaj lernejoj, pere de amaskomunikiloj aŭ dum aranĝoj. Averaĝe, la organizoj konsideris siajn informadan agadon, rilatojn kun la nejunulara organizo kaj eksterajn rilatojn bonaj, la engaĝigon de la nunaj aktivuloj oni taksis mezbona, dum la akirado de novaj aktivuloj ŝajnas aperi kiel malfacilaĵo. Laŭ la enketo, la plej multo de la asocioj havas kontakton kun la nejunulara landa sekcio, kaj multaj estas en kontakto ankaŭ kun lokaj grupoj aŭ aliaj landaj sekcioj.

Pri la estraroj de la asocioj eblas diri ke ili konsistas el diversnombraj anoj (de 1 ĝis 10) kaj la longeco de oficperiodo varias inter 1 ĝis 3 jaroj. La plimulto de la estraroj kunvenas fizike almenaŭ unufoje jare, dum retaj kunsidoj montriĝas sufiĉe neregulaj, sed pli ol duono de la asocioj uzas retan diskutliston. La plej populara informkanalo estas Facebook, ĝin sekvas retaj diskutlisto kaj dissendoj. Ok landaj sekcioj havas sian propran organon, el kiuj kvar estas retaj, kaj krom tri asocioj ĉiuj havas propran retejon. Pri la renkontiĝoj direndas ke la asocioj preferas organizi pli mallongajn (maksimume kvar-tagajn) eventojn, sed abundas ankaŭ pli longaj renkontiĝoj.

## Informado

raportas Sergeo Tyrin, unua vicprezidanto kaj estrarano pri informado

Komence de mia oficperiodo, la Estraro prilaboris laborplanon por sia unua jaro, kaj tiam mi difinis kelkajn ĉefajn celojn por la kampo de informado. Ĉi-sube mi detaligos tiujn celojn kaj la staton de ilia plenumo, samokaze ellaborante pri mia agado dum tiu ĉi unua jaro.

## Informado fare de la Estraro

Unu el la plej gravaj celoj estis intensigi la informfluan el la estraranoj de TEJO al la Komitato kaj membroj, tiel ke la laboro de la Estraro estu pli travidebla. Sekve, estis aperigitaj detalaj komunikoj pri la ambaŭ jam okazintaj fizikaj estraraj kunsidoj (aŭtune 2011 kaj printempe 2012). Antaŭ ili ambaŭ aperis ankaŭ anticipaj sciigoj kun la datoj kaj peto proponi gravajn temojn por diskuto – al tiuj ĉi alvokoj venis kelkaj reagoj.

Estis alprenita decido ke post ĉiu reta estrara kunsido (kiu okazas almenaŭ unufoje monate) estos sendata kurta resumo de la diskutitaj temoj al la komitata listo. Tiaj resumoj aperis jam komence de 2012, bedaŭrinde pro ŝanĝo de la volontulo, la fluo iom rompiĝis kaj mi esperas ke en la proksima jaro ili jes estos regulaj kaj akurataj. Pro la komitata decido igi ĝian diskutliston publike legebla, tiuj ĉi resumoj estos alireblaj ankaŭ por ĉiuj membroj de TEJO.

Far Łukasz Żebrowski estis restarigita 'prezidanta blogo' ĉe la retejo [tejo.org/blogo/prezidanto] – kaj en ĝi aperas laŭnecese informoj rilataj al stirado de la organizo kaj gravaj dokumentoj. Same, ekde numero 2012:2 de *Kontakto*, la movada rubriko *TEJO tutmonde*

enhavas ‘prezidantan kolumnon’, kun similaj koncizaj informoj. Tiuj ĉi kanaloj estas celitaj al la ĝenerala membraro, kaj espereble atingas kaj retemulojn kaj malretemulojn.

Krome, kvarfoje jare estas sendataj apartaj komunikiloj al la patronoj kaj honoraj membroj de TEJO – tiuj anstataŭas la numerojn de *TEJO tutmonde*, kiam ĝi ankoraŭ estis aparta revuo. Komence de 2012 resuma letero (kun bonvenigo realiĝi) estis sendita ankaŭ al ĉiuj individuaj membroj de TEJO.

## Eldonaĵoj

### Kontakto

Ĉiuj numeroj de *Kontakto* en 2011 aperis regule laŭ la antaŭcelitaj datoj – tio okazas danke al la akurateco de la redaktoro Rogener Pavinski. Kiam la numero estas pretigita, tuj aperas ĝia plenkolora PDF-versio en la Reta Teko de UEA (alirebla far TEJO-membroj kaj individuaj abonantoj). *Kontakto* krome havas viglajn Facebook-paĝon (169 abonantoj kaj ĉirkaŭ 1500 amikoj en antaŭa ‘persona’ konto), Ipernity-paĝon (94 abonantoj) kaj Twitter-anoncilon (396 sekvantoj).

### TEJO tutmonde

Ekde la jaro 2011, sekve de la decido alprenita jam pli frue, ĝi aperas kiel parto de *Kontakto* (unuan fojon en la numero 2011:1). La redaktoro estis Daniel (Dan) Mrázek el Ĉeĥio ĝis la numero 2012:1, post kiu anstataŭis lin Szabolcs (Szabi) Szilva el Hungario. En oktobro 2011 okazis interna pritaksado de la enhavo de *TEJO tutmonde*, rezulte de kiu estis preparita gvidlinia dokumento por TT. La nova redaktoro jam laboras laŭ tiu ĉi dokumento.

Prizorgata fare de la redaktoro, krom la enhavo por la presita rubriko *TEJO tutmonde*, estas ankaŭ la reta blogo de TT ĉe tejo.org, la TEJO-paĝo en la revuo *Esperanto* kaj voĉaj intervjuoj en la retradio Muzaiko. Estas kurioze konstati kiel la akcento sur tiu aŭ alia medio dependas de la redaktoro; sed ĉar ideale en ĉiuj kvar medioj la ĝisdatigoj estu viglaj, en la venontaj monatoj endas klopodi pri kreo de teamo gvidata far la redaktoro (ideoj pri ĝi ŝvebas jam de unu jaro, sed ne jam atingis konkretigon).

### TEJO-aktuale

Ankaŭ TA trapasis internan pritakson, similan al tiu de TT. Kelkajn punktojn substrekitajn kadre de tiu procedo ni jam komencis plenumi: nome TEJO-rilataj novaĵoj ĉiam komence de la informilo (konforme al ĝia nomo), la listo de eventoj ĉe kutima #10 en strikta kaj multe pli utila por la legantoj strukturo. La grafikan refreŝigon evidentiĝis malpli facile efektiviĝi, pro la ege kaduka sistemo per kiu TA estas funkciigata; tio ankaŭ estas la kialo de la komplikajoj en modifoj de ties retejo. Tion mi klopodos trakti kaj antaŭenigi en la dua duono de mia oficperiodo.

TA-eldonoj aperas regule ĉiun semajnon, kutime en vendredoj, redaktitaj far Julia Noe el Germanio, kaj kontrolitaj far mi. Ili ankaŭ estas laŭlegataj de Petra Smidéliusz por la retradio Muzaiko kaj estas aŭskulteblaj la venontan ĵaŭdon post la apero.

### **Dialog'**

Verŝajne ne multe konata al nunaj aktivuloj, tiu ĉi estis la nomo de iama novaĵletero de TEJO en aliaj lingvoj. Ne havante nun pli bonan nomon, mi uzas ĝin kiel kodo-nomon, por la simila ideo – kiu estas multlingvaj kurtaj informiloj far TEJO por homoj el-ekster la Esperanto-movado. Ĝis nun okazis en majo 2012 diskuto pri la esenco kaj enhavo de tiuj informiloj (al kiu kontribuis Sarolta Bagó, Veronika Poór, Michael Boris Mandirola kaj Manuela Ronco); sed daŭre estas necesa pli klara imago kion ili enhavu kaj kiom ofte aperu. Estas dezirindaj tre konkretaj gvidlinioj antaŭ ol lanĉi tian servon, ĉar temas pri kreado de imago ne nur pri TEJO sed pri la Esperanto-movado ĝenerale.

### **Aliaj komunik-kanaloj**

El inter la celoj en la estrara laborplano aperis ankaŭ ekuzo de novaj kanaloj por informado. Plej grava progreso ĉi-rilate okazis koncerne la junan retradion Muzaiko, kun kiu TEJO nuntempe havas intensan kunlaboron. Jam dum la unua fizika kunsido de tiu ĉi Estraro estis registritaj voĉ-materialoj kaj ili estis kunmetitaj en raporton pri la kunsido kaj sinprezentojn de la estraranoj, aŭdigitaj plurfoje en Muzaiko. Krome, aperis temp'-al-tempo son-raportoj far la kernaj aktivuloj de TEJO pri diversaj agadoj, interalie tre detalaj pri la komitata kunsido dum JES 2011/12 (aranĝitaj far Christopher Kerr). Menciindas la intervjuoj kun Wang Shanshan, Paweł Fischer-Kotowski, Przemysław Wierzbowski kaj Zsófia Pataki, faritaj de Rogier Huurman okaze de la elektoj de komitatanoj B de TEJO.

Kiel jam dirite, TEJO-aktuale estas akurate laŭlegata ekde la numero 303 (komenco de marto 2012). Kiam Daniel Mrázek ankoraŭ estis redaktoro de TT, li iniciatis la rubrikon “*TEJO tutmonde* intervjuas” – mi opinias tiun ĉi iniciaton pluviviginda kaj kune kun la nuna redaktoro Szabolcs Szilva pripensas la manieron fari tion. Planata agado por la Hanoja IJK estas realigado de ĉiutagaj elsendoj (voĉe en Muzaiko kaj Ĉina Radio Internacia, skribe en la blogo de TT), kiuj donu al la neĉeestantoj la impreson kion ili maltrafas.

Estis pliintensigita ankaŭ la kunlaboro kun Libera Folio – en ĝi aperis plurfoje sciigoj pri la okazaĵoj ene de TEJO, ĉu forme de artikoloj ĉu de intervjuoj. Ĉar LF, kiel inform- ĵurnalo facile alirebla, havas gravan rolon ene de la ĝenerala movado, mi taksas tiun ĉi pozitivan kunlaboron tre signifa por TEJO kaj certe daŭrigenda.

Kroma komunik-maniero iom nova en TEJO estas la vida – por la remembrigita kampanjo de 2012 estis pretigita speciala varba video, kiu estis afiŝita en la YouTube-kanalo de TEJO (kaj cetere subtekstigita en dek lingvojn). Ĝi dume estas la sola video en tiu kanalo.

### **Landaj sekcioj**

Komencante la oficperiodon, mi kaj la estrarano pri landa agado, Petra Smidéliusz, havis la ideon intensigi la rolon de TEJO kiel ‘ombrela organizo’ por ĝiaj landaj sekcioj, provizante



unu centran spacon kie LS-j povu afiŝi siajn eventojn kaj kiun membroj povu konsulti interesigante pri junularaj aranĝoj. Tiamaniere oni ne devus serĉi tra pluraj retejoj elinter amaso da informoj pri aliaj nejunularaj informoj.

Mi bedaŭre devas agnoski la fiaskon de tiu ĉi plano. Ni alfrontis malkunlaboremon de LS-j kaj sukcesis kolekti tre malmultajn informojn. Eĉ kiam estis ricevitaj respondoj, plejparte ili ne havis konkretajn detalojn pri specifaj aranĝoj, sed nur ĝeneralan priskribon de kiatipa agado okazas laŭlonge la jaron. Kvankam estis starigita speciala kalendaro ĉe [esperanto.com](http://esperanto.com), ĝi restis malplena. Tiu ĉi agado, kvankam kunordigita de TEJO, bezonas aktivan involviĝon de LS-j, kiuj ne forgesu sendi la detalojn se ili okazigas iun lokan aranĝon.

## Retpaĝaro

La ideo renovigi tejo.org jam aĝas iom sed por antaŭenigi ĝin estis konkretigitaj la necesaj paŝoj, aluditaj en la estrara laborplano. Antaŭe estis konsiderata uzado de pmWiki anstataŭ Drupalo, sed tio evidentiĝis maloportuna por la bezonoj de TEJO; ni plu restos kun Drupalo, sed ĝi estos aktualigita al la lasta versio en aŭgusto. Estis jam trovitaj homoj kiuj helpas pri restrukturigo de la retejo, tiel ke ĝia formo estu pli taŭga por TEJO kaj pli konvena por la diversaj tipoj de vizitantoj al la retejo. Por efektiviĝi tiun paŝon, unue necesas krei la diagramon de la diversaj paĝoj kaj ilia esenco (ĉu statikaj informoj pri la organizo, ĉu ripetiĝantaj periode, ĉu konstante aktualigataj) – pri tio mi okupiĝas nun; samtempe la enhavo de la paĝoj estas sisteme ĝisdatigata. Post kompletigo de la diagramo, kaj samtempe al la replanado, eblis starigi teamon de tradukantoj kiuj zorgos pri krei la tradukojn por la necesaj paĝoj, kaj tiel denove havi vere multlingvan tejo.org.

## Informa Komisiono

Dum la pasintjara IJK estis kreita komisiono pri informado kies komisiito estiĝis Rogier Huurman. La komisiono havis du celojn: elpensi grafikumadon de T-ĉemizo kaj aliaj akcesoraĵoj por TEJO ('mojosaĵoj'), kaj kolekti informilojn de diversaj LS-j, kreante el ili unu tradukeblan informilon por la informada agado de la junaj E-grupoj. Bedaŭrinde la komisiono ne sukcesis ekfunkcii kaj sekve mi transprenis la taskojn de ties komisiito.

Dum novembro 2011 estis kolektataj proponoj por grafikumado de TEJO-a T-ĉemizo kaj en la unua semajno de decembro okazis publika voĉdono pri ĉiuj alvenintaj proponoj. El tiuj, kvankam komence la intenco estis elekti du plej bonajn, finfine estis akceptitaj la tri unuaj – ĉar la unua kaj dua loko samforte estis ŝatataj, kaj la tria vostis tuj poste. La T-ĉemizoj estis produktitaj en decembro kaj haveblis jam dum JES; ilin ankaŭ senpage ricevis la fruremembriĝantoj al TEJO kadre de la membrokampanjo 2012. Ĝuste nuntempe estas pripensata ankaŭ T-ĉemizo por *Kontakto*, kiu haveblos verŝajne aŭtune. Aliaj akcesoraĵoj ne jam estis traktitaj – aperis kelkaj ideoj, kiuj tamen ankoraŭ ne estis evoluigitaj.

Rilate la unuecan informilon, ne multa progreso okazis. Nur kelketaj LS-j respondis entute al la alvoko, sekve la sola uzebla materialo estas la malnovaj TEJO-informiloj – kiuj ne estis malbonaj, sed bezonas ioman grafikan refreŝigon, kaj delonge elĉerpiĝis. Tion mi plu traktos en la dua duono de la oficperiodo.

## Pasporta Servo

Ĉi tie mi ŝatus tuŝi la flankon de informado rilata al Pasporta Servo. Jam en novembro estis reaktivigita la blogo de PS [tejo.org/blogo/PS], en kiu Daniel Bebelacqua aktive informis pri sia laboro dum la tre vigla fazo fine de la 2011-a jaro. Tamen, komence de 2012 estiĝis ne klara situacio rilate la estontecon de PS, sekve ankaŭ la laboroj bremsiĝis, kaj ne estis multo por raporti. Post la pozitiva voĉdono far la komitato, la prilaborado regajnas sian ritmon, kaj inter miaj taskoj estos zorgi ke je ŝanĝoj kaj/aŭ plibonigoj aperu ĝisdatigoj en la blogo. Aliaj taŭgaj medioj por trafe informadi estus la TEJO-paĝo en Facebook, la retroŝta diskutlisto pri PS kaj tiaj informiloj kiel Libera Folio. Estis laŭ mi tre grava la aperigo de la artikolo/intervjuo en la revuo *Esperanto* (julio-aŭgusto 2012) pri la komitata voĉdono kaj la estonteco de Pasporta Servo; certe ekzistas homoj ne havantaj ligan al la kutimaj komunikokanaloj de TEJO kaj eĉ se sporade, tamen tiaj informoj en la ĝenerala gazetaro kreas la necesan ligan inter ili kaj PS.

## Eksteraj rilatoj

raportas Michael Boris Mandirola, dua vicprezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj

Eksteraj rilatoj konfirmiĝas aktiva agadkampo de TEJO, en la koncerna komisiono, KER aktive kontribuas diversnivele manpleno da valoraj aktivuloj kiuj permesas fruktodonan plurfrontan agadon.

Verŝajne la plej aktiveca kadro estis Forumo Junulara Eŭropa. Komence de septembro okazis eventego pri volontulado en Bruselo en kiu partoprenis 18 TEJO-anoj, el kiuj Quentin Weber-Seban (ano de FOJE-laborgrupo pri junularo) kaj Alisa Nikitina en la konferenco de interesportantoj pri volontulado, Francesco Maurelli en EU-ĉina simpozio. Aliaj ĉeestis informan budon kaj partoprenis la organizon de du metiejoj: "Administrado de renkontiĝoj" gvidita de Martin Sawitzki kaj "Iĝu esperantisto" kun baza kurso de Szabolcs Szilva kaj tabloludo esperantenkonduka. La partoprenon de TEJO kunordigis Manuela Ronco kaj la respondeca estrarano estis Nico Huurman.

Krome Francesco Maurelli estis elektita por partopreni en la FOJE-delegitaro en Pekino al EU-ĉina Junularestra Pintkunveno oktobre 2011 kaj denove aprile 2012 Brusele por evento pri EU-ĉina Altnivela Popol-al-popol-dialogo.

TEJO estis ankaŭ reprezentita oficiale en la membrokonsilio de FOJE de Michael Boris Mandirola kun Veronika Poór en Brago en novembro 2011 kaj kun Sarolta Bagó en aprilo 2012 en Bruselo. Michael Boris Mandirola kandidatiĝis kiel reprezentanto de FOJE al la konsila konsilio pri junularo de Konsilio de Eŭropo. Bedaŭrinde la kandidatiĝo estis malsukcesa kaj evidentiĝis kiel la voĉdonoj okazas plejparte bloke kaj neaparteno al bloko igas kandidatiĝon preskaŭ nesukcesebla. En aprilo 2012 TEJO proksimiĝis al la interŝanĝorganiza bloko en kiu membras aliaj organizoj nepartiaj kaj nereligiaj.

Pri aliaj FOJE-aferoj Veronika Poór partoprenis renkontiĝon en Bruselo cele al pledado por Junularo en Agado, TEJO sendis siajn reprezentantojn al la konferenco pri junuloj kaj laboro subtenita de OEKE, decembre 2011 en Parizo partoprenis Veronika Poór kaj Francesco Maurelli; krome Michael Boris Mandirola partoprenis en la kunveno por difini la strategiajn

priortitatojn de FOJE dum venontaj jaroj kaj fine TEJO-anoj ankaŭ provizis tradukon en Esperanto, sed ankaŭ en la itala kaj en la kataluna pri la ĉarto de la volontulaj rajtoj.

Pri aliaj organizoj, Veronika Poór multe okupiĝis pri la rilatoj kun Unesko, kie TEJO pluumis sian pasintjaran revenon. En tiu kadro la ĉefa agado estis kiam Nico Huurman kaj Veronika Poór reprezentis TEJO-n ĉe la Junulara Forumo de Unesko. Krom multaj klarigoj pri Esperanto al aliaj reprezentantoj en la koridoroj, ili sukcesis enigi mencion pri efika kaj nediskriminacia lingvolernado en provizoran tekston, sed bedaŭrinde ĝi ne eniris la finan deklaron.

TEJO ne oficiale estas en konsultaj rilatoj kun Unesko, sed danke ILEI (kaj pli specife al la delegitoj Monique Arnaud, Jean-Pierre Boulet, Barbara Despiney kaj Renée Triolle), TEJO reprezentis ankaŭ ĉe la Ĝenerala Konferenco de Unesko danke al Veronika Poór, kiu plenerferis tri semajnojn al la celo.

En junio Guillaume Armide, Barbara Despiney, Veronika Poór kaj Renée Triolle denove kunreprezentis UEA-n kaj TEJO-n kadre de du samatagaj Unesko-eventoj, unu por informi la NRO-jn, la alia por NRO-j kiuj interesiĝas pri homaj rajtoj, paco kaj kultura diverseco. Tiukadre diskutiĝis la strategia plano kaj buĝeto de Unesko dum venontaj jaroj.

TEJO ankaŭ rerilatiĝis al ICMYO, la Internacia Kunordig-Renkontiĝo de Junularaj Organizoj. Ĝi kolektas la plej grandajn mondajn junularajn organizojn kaj celas ĉefe laboron orientitan al UN. Nun la KER-retadreso estis enigita en la novan retliston, sed bedaŭrinde tio okazis tro malfrue por ke TEJO povu esti reprezentita en la jara renkontiĝo en 2011.

TEJO kaj UEA estis ankaŭ reprezentataj ĉe Youth Blast (konferenco de la junularo por Rio+20), Rio+20 (Konferenco de UN pri daŭripova evoluo) kaj en Kupolo de la Popoloj (kunveno de NRO-j kaj sociaj movadoj). Kadre de tiu laste menciita evento okazis ankaŭ la Tutmonda Forumo pri Liberaj Amaskomunikiloj, en kiu Rafael H. Zerbetto reprezentis Muzaikon.

Dum ĉiuj eventoj okazis intensa varbado pri Esperanto kaj esperantistoj sukcesis disdoni broŝurojn "Malkovru Esperanton" kaj broŝureton de UEA pri lingvaj rajtoj al pluraj aktivuloj kaj aŭtoritatoj, inter ili (eks-) ministroj, diplomatoj, famuloj kaj eĉ al Ban Ki Moon, ĝenerala sekretario de UN.

Dum Rio+20 okazis prelego pri Esperanto, gvidata de Ursula Grattapaglia, Francisco Stefano Wechsler (fondinto kaj unua prezidanto de BEJO), kaj Renata Pacheco Ventura. Rafael H. Zerbetto partoprenis en du specialaj eventoj organizitaj de la NRO-koalizio GCCA kaj inkluzive parolis en Esperanto al plenplena aŭditorio. Rafael H. Zerbetto ankaŭ ekkonis Brittanyn Trilford kaj konsciigis ŝin pri la graveco de lingvoj por daŭripova evoluo. Rafael H. Zerbetto kaj James Milanez reprezentis nian movadon ankaŭ en la evento Tohoku Forward, organizita de la Japana Registaro.

Supozeble okazus pluraj prelegoj pri Esperanto en la Kupolo de la Popoloj, tamen pro la dinamiko de la publiko, oni konsideris pli fruktodona varbi pri Esperanto rekte al la preterpasantoj kaj tiun gravan laboron kompetente gvidis Alvaro Motta.

Ankaŭ la rilatoj kun aliaj organizoj bone disvolviĝas. Nico Huurman kaj Michael Boris Mandirola prezentis Esperanton kadre de la Eŭropa Estrara Renkontiĝo de AEGEE (Eŭropa

Studenta Forumo), kun kiu nun pluumas kunlaboro cele al komuna seminario pri lingvaj politikoj. Alia kunlaboro okazis kun Eŭropa Vegetarana Unuiĝo (kun UEA kaj TEVA) por metiejo kadre de Rio+20. Persona kontakto ludis fundamentan rolon en ambaŭ kunlaboroj ja, Nico Huurman estis estrarano de AEGEE kaj Francesco Maurelli estas estrarano de EVU.

Ankaŭ laŭ interna vidpunkto pri la komisiono mem okazis progresoj, danke al la ideo kaj la prepara laboro de Veronika Poór, dum JES okazis KER-trejnado gvidita de Michael Boris Mandirola kaj Nico Huurman kun pli-malpli deko da partoprenantoj. Alia projekto estas KER-Vikio por kolekti raportojn kaj aliajn tekstajn utilaĵojn. Krome jam okazis ankaŭ konfirma membroenketo kaj estas celo daŭrigi en pli strukturigita maniero.

Fine la informado pri la laboro de KER okazas regule, tiel ke aperis pluraj artikoloj en *Esperanto* kaj *TEJO tutmonde* (kies redaktoro Szabolcs Szilva membras en la KER-listo) pri pluraj KER-aĵoj. Ĉi-kadre grava estis ankaŭ la kunlaboro kun Muzaiko, kiu ofte intervjuis kaj elsendis pri KER kaj pri la supre menciitaj eventoj; apartan atenton meritas ĝia laboron kadre de Rio+20.

## Edukado

raportas Petra Smidéliusz, estrarano pri landa agado kaj edukado

La ĝenerala stato de tiu laborkampo ne estas kontentiga, necesus fari multe pli.

Mi sukcesis lanĉi projekton kadre de kiu TEJO-membroj ricevas rabaton el la prezo de la ekzameno laŭ Komuna Eŭropa Referenckadro (ĝis nun partoprenis ses personoj: tri el Meksiko, du el Rusio kaj unu el Argentino).

Bedaŭrinde aktiva kunlaboro kun ILEI ne realiĝis ankoraŭ, post la elekto de la nova Estraro de ILI mi provos denove.

Planoj por la estonteco:

- aktiva kunlaboro kun edukado.net kaj ILEI
- trejnadoj por junaj instruantoj

## Kongresoj

raportas Tina Tišljár, estrarano pri kongresoj

## IJK 2012

Post la rezigno de Japana Esperanto-Junularo organizi IJK-n en Japanio oni rapide devis decidi pri nova loko. La kialoj de la rezigno estis la malkonsento ene de JIJ – ĉefe temis pri malsamaj opinioj inter la prezidanto de la LKK kaj la resto de la membroj de la organizo, kiuj ne sentis sin sufiĉe pretaj kaj kapablaj organizi grandan eventon.

La strebo de la Estraro estis, ke IJK 2012 tamen okazu en la orienta Azio, do oni tuj komencis serĉi novan organizanton. Post komunikado kun kelkaj ĉinaj Esperanto-grupoj kaj kluboj oni

konstatis ke en tiom mallonga periodo estus tre riske organizi IJK-n en Ĉinio. Tamen la pozitivaĵo estis la kontaktoj kun la ĉina movado, kiujn ni rehavis.

La sola orientazia lando kiu en tiu momento havas sufiĉe fortan junularan movadon estas Vjetnamio. Pro la jam organizanta UK, la vjetnama junularo prezentis sin kiel plej bona elekto por organizi IJK-n en nur ses monatoj.

Pro la manko de sufiĉa prepartempo IJK 2012 verŝajne ne estos la plej kompleksa programe, sed la organiza teamo estas sperta pro la IJK, kiun oni jam organizis en Vjetnamio en 2007 kaj kun ĝis nun pli ol 120 aliĝintoj kredeble la kongreso estos sukcesa.

### **Konkurso “Partoprenu IJK-n”**

Venis dek kandidatiĝoj por la konkurso. Oni subtenis kvin kandidatojn: Jeremie Sabiyumva el Burundo, Rafael Henrique Zerbetto el Brazilo, Karina Maĝosa kaj Paweł Fischer-Kotowski el Pollando kaj Francesco Maurelli el Italio/Skotlando.

### **IJK 2013**

La konkurso estis farita dum la lastaj monatoj de 2011 kaj la decido estis farita en februaro 2012. Venis tri kandidatiĝoj – GEJ, JELI kaj MEA. La decido estas, ke en 2013 IJK okazos en la norda Israelo. JELI havis la plej grandan organizan teamon kaj la plej realan kandidatiĝon kun bone priskribitaj planoj pri la kongreso. La preparoj jam komenciĝis.

### **IJK 2014**

La konkurso estas malfermita kaj la limdato por kandidatiĝi estas la 15-a de oktobro 2012. La rezultoj estos konataj ĝis la fino de oktobro 2012.

## **Aktivula trejnado kaj seminarioj**

raportas Nico Huurman, tria vicprezidanto kaj eksa estrarano pri aktivula trejnado

Progresas la kreado de la aktivula datumbazo, sistemo kun informoj pri niaj aktivuloj, iliaj kapabloj kaj trejnspertoj. Clemens Fries dum la printempa kunsido de la Estraro prezentis provversion kaj laŭ la tie faritaj sugestoj kaj prioritatigoj pluevoluos ĝin ĝis mezo de septembro 2012. Laŭ la nuna tempoplano, post somero ni havos version en kiu la ĉefaj partoj devus funkcii.

Dum la Junulara E-Semajno en Gdańsk, dum Novjaro okazis trejnado pri eksteraj rilatoj. La enhavon de la trejnado pretigis Veronika Poór kaj ĝin gvidis Michael Boris Mandirola kaj Nico Huurman.

En januaro 2012 kreiĝis teamo konsistanta el homoj de TEJO kaj la Eŭropa Studenta Forumo AEGEE por organizi komunan seminarion pri la eŭropa lingvopolitiko. La teamo pretigis subvencipeton por la Eŭropa Junulara Fonduso, sed bedaŭrinde antaŭnelonge eksciis ke tiu

peto estis rifuzita. Momente ni estas serĉantaj aliajn monfontojn. Ni konsideras la programon Junularo en Agado, Esperantic Studies Foundation, Fonduson de la Kataluna Registaro kaj kelkajn aliajn. Laŭ la origina plano la seminario devus okazi en Delft en marto 2013, sed tio povas ŝanĝiĝi rezulte de la nova subvenciserĉado.

Fine de marto okazis ŝanĝo en la Estraro. Pro la demisio de Alisa Nikitina, Nico Huurman transprenis la postenon de kasisto. Liajn taskojn en la kampo de aktivula trejnado transprenis la komisiito Przemysław Wierzbowski. Ĉi-momente okazas finverkado de la strategio pri bezonataj aktivuloj kaj kompetentoj.

## Volontulo

raportas Natalia Antolak, volontulo

Tiu ĉi jaro por la Centra Oficejo estis iom specifa. Dum la oficperiodo okazis kroma ŝanĝo de volontulo. Sébastien Denux oficis ekde septembro 2011 ĝis februaro 2012. Mi eklaboris en la CO la 7-an de februaro 2012 kaj daŭrigos proksimume ĝis la fino de aŭgusto aŭ komenco de septembro 2012. Plie, ekde ĉi-jaro TEJO havas oficiston, kiu parte transprenis taskojn de volontulo. Do kreiĝis neceso iom redifini tion, kio estas en la taskaro de volontulo.

La plej kutimaj farenaĵoj restis samaj. Volontulo respondecas pri konstanta prizorgado de alvenantaj retpoŝtmesaĝoj kaj leteroj, aldonas aktualaĵojn al tejo.org, publikigas diversajn aferojn en la paĝo de TEJO-Oficejo en Facebook, foje aktualigas informojn en Pasporta Servo kaj simile. Plej ofte tiuj rutinaj taskoj estas tute facile fareblaj, tamen foje subite fariĝas defiaj pro malnova jam kaj iom paneanta komputilo. Krom TEJO-taskoj volontulo tradicie helpas en diversaj aktivaĵoj de la Centra Oficejo, kiel ekzemple voĉlegado de la revuo *Esperanto* por blinduloj aŭ helpado en la Esperanto-budo en foiroj.

Plej granda ŝanĝo, kompare al la antaŭaj jaroj, estas evidente verkado de subvencioj, kiu estis ŝovita el la taskoj de volontulo al tiuj de oficisto. Transdono de tiu tre spertopostula laboro al homo ne ŝanĝiĝanta tiom ofte, sendube permesis pli racie distribui laborrimedojn de la volontulo. Konsekvence kontribuo de volontulo en subvencipetado limiĝis ĉefe al kompletigado de dokumentoj, prizorgado ke ili estu ĝuste subskribitaj kaj stampitaj, kaj fine forsendado.

Al la taskoj de volontulo apartenas reprezentado de la organizo en eventoj. En IJK 2011 en Kievo faris tion Manuela Ronco. En JES 2011 en Gdansko TEJO-budon prizorgis Sébastien Denux. Mi jam prepariĝas por la samo en la baldaŭ okazontaj UK kaj IJK en Hanojo.

Estas ankaŭ kelkaj pliaj aparte menciindaj aferoj en periodo dum kiu mi laboras ĉi tie. Komence, krom lerni kiel fari ĉion, aparte multan tempon prenis plenumado de nefaritaj taskoj, kiuj akumuliĝis pro kaoso ligita kun la ŝanĝo de volontulo. Meze de aprilo 2012 okazis en Varsovio kunveno de la Estraro, en kiu mi protokolis kaj asistis la Estraron en ties laboro. Marte kaj aprile 2012, okaze de la elektoj de komitatanoj B, aparte amasiĝis traktado de problemaj aliĝoj kaj dissendado de balotiloj kune kun leteroj. Alia amasa reta komunikado kaj paperpoŝta dissendado okazis maje 2012 kaj temis pri T-ĉemizoj, kiuj estis premioj en la membromarkampanjo okazinta komence de la jaro. Fine de junio 2012 estis dissendita letero al patronoj, kiun akompanis invito al la Patrona Akcepto en la hanoja UK.

## Oficisto

raportas Manuela Ronco, oficisto

La 3-an de oktobro 2011, ĉirkaŭ monaton post la fino de mia unujara volontulado en la Centra Oficejo, mi iĝis la unua dungita oficisto de TEJO. Mi ricevis tiun ĉi oficon kiel honoron, sed ankaŭ kiel grandan respondecon, havante multajn atendojn kaj bonajn intencojn rilatajn al ĝi. Post unu jaro mi iom bedaŭras diri ke ne multaj el ili plenumiĝis, ne ĉiam pro faktoroj kiuj de mi dependas. Malgraŭ tio, mi daŭre havas la esperon je pliboniĝo, kaj strebas lerni el la spertoj por atingi estonte pli kaj pli da kontentigaj rezultoj.

Pluraj malfacilaĵoj dum tiu ĉi jaro rilatis la fakton ke mia posteno ne ekzistis antaŭe. Tio verŝajne signifis ian rompiĝon en la tradicia organiza sistemo, kaj bezonon lerni kune kiel mastrumi la novan situacion. Necesis (kaj foje ankoraŭ necesas) iel eksperimenti, por kompreni kiel plej efike kunlabori: kiujn celojn kaj strategiojn adopti, kiel disdividi la taskojn kaj la respondecojn, kiel komuniki ktp.

Laŭ mia persona vidpunkto, estis defia ankaŭ la praktika organizado de mia labortempo kaj de miaj taskoj. Mi laboras partatempe (kun sufiĉe flekseblaj horoj) kaj distance (kutime el mia hejmo en Italio). Kvankam tia situacio donas sendube diversajn avantaĝojn al mi, ĝi postulas multe da streboj kaj kapablo de sinregado. Krome, ofte malhelpas kaj malrapidigas mian laboron mia fizika malĉeesto el la oficejo en Roterdamo, kion la daŭra ĉeesto de la volontulo nur parte kompensas.

Pli konkrete, inter miaj taskoj dum la pasinta jaro estis:

- instrui la laboron al la volontuloj Sébastien Denux kaj Natalia Antolak, je la komenco de ilia volontulado (respektive en septembro kaj februaro) kaj subteni diversmaniere ilian laboron dum la tuta jaro;
- okupiĝi pri subvencipetoj kaj kunordigado de projektoj (i.a. la administraj subvencioj de Youth in Action kaj Europa Junulara Fonduso, la seminarion pri lingvopolitiko kunlabore kun AEGEE, la peto de akreditigo de TEJO kiel gastiga organizo de Europa Volontula Servo, kaj kunlaboro en kelkaj subvencipetoj pretigataj de KOSMO);
- kolekti kaj disponigi diversajn informojn kaj asisti la estraranojn, ĉefe pri financoj, sed ne nur. Interalie mi partoprenis al la du fizikaj kaj al preskaŭ ĉiuj retaj kunsidoj de la Estraro de TEJO kaj al la eksterordinara kunveno de la Komitato dum JES;
- reprezenti la organizon dum kelkaj eksteraj aranĝoj, kiel la 6-a Foiro pri Edukaj Iloj en Tallin kaj la Ĝen-Sek Tago de Europa Junulara Forumo en Bruselo;
- neformale kaj provizore kunordigi la komisionon pri adoleska agado;
- provizi informojn kaj reklami pri trejnadaĵoj kaj kunlaboraj eblecoj.

Mi ankaŭ sekvas ĝenerale la okazaĵojn en la organizo kaj foje simple faras tion, kio estas plej bezonata en tiu momento. Mi klopodos daŭrigi en tiu ĉi posteno kun pli da saĝeco kaj esperas trovi renovigitajn motivojn kaj energion por tion fari.

## Komitato de UEA

raportas Nico Huurman, tria vicprezidanto kaj komitatano A de UEA por TEJO

Nico Huurman kaj Marek Blahuš ambaŭ ĉeestis la kunsidon de la Komitato de UEA en Kopenhago en 2011. Nico Huurman prezidis tie la subkomitaton pri junularo kaj Marek Blahuš prezidis la subkomitaton pri informado.

La ĉefa temo de la subkomitato pri junularo estis dokumento enhavanta konkretajn rekomendojn por allogi pli da junuloj al Universala Kongreso de Esperanto. Tiuj rekomendoj interalie temas pri malmultekosta loĝado, duonigo de la antaŭpago kaj ebleco transdoni ĝin al alia persono, interesa junulara programo kaj karavano inter IJK kaj UK. La Komitato de UEA aprobis la rekomendojn.

La dua grava agado dum la kunveno de la Komitato de UEA en Kopenhago rilatis al la Elekta Komisiono de UEA. Tiu komisiono havas la taskon serĉi kaj rekomendi kandidatojn por la Estraro de UEA, kiun la Komitato plej proksime elektos dum la UK en 2013. Marek Blahuš proponis Nico Huurman kiel kandidaton por la komisiono. Nico Huurman prezentis sin substrekante ke li atentis pri la preteco de eventualaj kandidatoj por la Estraro rilate al ŝanĝoj en UEA, ĉefe sur la kampo de reta agado. El 54 voĉoj, Nico ricevis 43 kaj estis elektita al la Elekta Komisiono kun Ulrich Lins kaj Lee Young-Kee.

## Reta agado

raportas Marek Blahuš, komisiito pri reta agado

Kiel reta mekanikisto, mi ĉefe zorgis, ke la reta servilo luata por tejo.org kaj pasportaservo.org bone funkciu. Kelkfoje dum la jaro necesis kontakti la firmaon Midphase por korektigi paneon, sed la subitaj kapricaj haltigoj pro “trouzo” de rimedoj bonŝance ne plu okazas, pro kio pripensata ŝanĝo de servilprizorganto intertempe fariĝis malaktuala. Pri la enhavo de la retejoj de TEJO respondecas aliaj personoj, sed mi foje helpis ekzemple riparante datumon en la datumbazo, farante sekurkopiojn aŭ ĝisdatigante la liston de IJK-j. Laŭ petoj de la Estraro mi administris ankaŭ retpoŝtajn plusendo-adresojn. Krome, mi zorgis pri ĝisdatigado de la informoj pri TEJO (IJK, voluntulo, Estraro, PS, LS-j) en Vikipedio kaj asistis al aliuloj pri la samo. Pri Pasporta Servo, kiu nuntempe provizore funkcias en aparta (privata) servilo respondecas aparta teamo de aktivuloj.

## Pasporta Servo

raportas Alexandre Baudry, komisiito pri Pasporta Servo

La agoj kadre de Pasporta Servo konsistis ĉefe en pluevoluigo de la retejo, far Daniel Bebelacqua. Okazis ankaŭ prilaboro de la sistemo uzata interne por pretigo de la adreslibro: antaŭe ĝi estis farita pere de Excel, sed tiu softvaro ne estis sufiĉe konvena por prilabori la datenojn. Necesigis do transiro al sistemo pli taŭga, nome Base de OpenOffice.

Dum la jaro 2011/2012 okazis ankaŭ du ĉefaj eventoj. La unua fine de 2011 estis alvoko por transpreno de pluraj volontulaj postenoj, nome: kompilanto, kunordiganto, respondanto al leteroj, provleganto, grafikisto, komputilisto, mapfaranto. Bedaŭrinde tiu ĉi alvoko ne trafis la celon, ĉar por kelkaj postenoj homoj ne estis trovitaj.



La dua estis voĉdonado de la Komitato rilate la estontecon de Pasporta Servo, kiu okazis komence de 2012. La Komitato voĉdonis por pludaŭra ekzisto de la servo laŭ ĝia nuna stato, kun pluaperigo de la adreslibro.

## Adoleska agado

raportas Manuela Ronco, oficisto kaj provizora respondeculo pri adoleska agado

La Komisiono pri adoleska agado, kreita en novembro 2010, travivis sian unuan jaron en preskaŭ kompleta neaktiveco. Dum la kunsido de la Estraro en septembro 2011 oni proponis ekagi por ĝia reaktivo, malgraŭ la manko de komisiito kiu pretus respondi pri ĝi. Mi provizore kaj neformale transprenis tiun ĉi rolon. En la sekva monato mi forigis el la diskutlisto homojn, kiuj petis forigon aŭ ne reagis al mia mesaĝo, sekve mi dissendis alvokon por novaj komisionanoj en tejo.org, en diversaj diskutlistoj kaj al kelkaj personaj kontaktoj. Mi ricevis kelkajn pozitivajn reagojn, kaj en la diskutlisto (tejo-adoleskuloj@googlegroups.com) nun membras 17 homoj. Inter ili estas junaj esperantistoj en adoleska aĝo, aktivuloj de la junulara movado kaj kelkaj gepatroj de adoleskuloj. Sume ekde oktobro estis senditaj en la listo 47 mesaĝoj. Tiu nombro sufiĉe malgrandas, ĉefe ĉar la malĉeesto de oficiala gvidanto igas la diskutojn iom abstraktaj kaj mankas konkretaj proponoj kaj instigo al serioza laboro. Eta ago, kiu rezultis el la diskutoj en la listo, estis la kreo de la Facebook-grupo “Esperantistoj Sub18” (<https://www.facebook.com/groups/adoleskuloj/>), por kunigi esperantistajn adoleskulojn. En ĝi membras nun 34 homoj, plejparte sub18-jaraĝuloj.

## TEJO-aktuale

raportas Julia Noe, redaktoro pri TEJO-aktuale

TEJO-aktuale estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas ĉiun duan semajnon kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara Esperanto-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj. TEJO-aktuale estas abonebla retpoŝte (<http://www.uea.org/retlistoj>) kaj legebla ankaŭ en la retpaĝo (<http://www.tejo.org/ta>). Kontribuoj ĉiam estas bonvenaj per la retformularo en la retpaĝo aŭ retpoŝte al tejo-aktuale@tejo.org.

Nuntempe alvenas tiom da novaĵoj, ke la informilo povas aperi preskaŭ ĉiusemajne, depende de la tempo de la redaktoro. Antaŭ kelkaj monatoj la dissendo-adreso de la retpoŝta abono estis ŝanĝita de officejo@tejo.org al tejo-aktuale@tejo.org, por ke la reagoj rekte venu al la redaktoro, sen kromvojo al la officejo.

Kelkaj aĵoj, kiuj povus esti plibonigitaj:

- mi daŭre uzas la retaliron de mia antaŭulo por enmeti la aktualan eldonon en la retpaĝo tejo.org/ta, ĉar ĝis nun neniu sukcesis krei propran konton por mi;
- TA devus esti elektronike arkivita de TEJO, sed mi ĝis nun ne ricevis informojn kie kaj kiel;
- en la retpaĝo tejo.org/ta ankoraŭ estas la malnova marko de TEJO kaj varbkampo por *lernu!*, kies marko ne plu funkcias;
- la kontaktilo sendas al aktuale-red@tejo.org, kiu daŭre estas spamata, ĝi prefere sendu al tejo-aktuale@tejo.org;
- la print-funkcio en la retpaĝo ne plu funkcias.

## Statistikoj pri TEJO-aktuale

laŭ la stato de la 4-a de julio 2012

Retpoŝtaj abonantoj: 708

La nombro de la retpoŝtaj abonantoj malaltiĝis de ĉirkaŭ 800 en 2012 je 100 abonantoj pro la ĝisdatigo kaj forigo de la nefunkciantaj retadresoj, kaj ekde tiam ĝi denove kreskas.

Vizitantoj de la retpaĝo (ekde la 26-a de aprilo 2004):

Entute la paĝoj estis ŝarĝitaj: 460325 fojojn (102050 ekde la 9-a de junio 2011)

La paĝaron vizitis:

- entute: 12465 personoj

Paĝoj, de kiuj plej ofte venas la vizitantoj:

- <http://search.live.com/results.aspx?q=aktuale> - 309 fojojn (serĉilo)
- <http://www.tejo.org/t-a> – 276 fojojn (TA-priskribo ĉe tejo.org)
- <http://www.tejo.org/eldonoj.jsp> -228 fojojn (TA-priskribo ĉe la malnova retejo)
- <http://www.tejo.org/> - 189 fojojn
- <http://search.live.com/results.aspx?q=aktuale&form=QBHP> - 115 fojojn (serĉilo)
- <http://esperanto-panorama.net/unikode/legu.htm> – 110 fojojn (malnova listo de gazetoj)
- <http://search.live.com/results.aspx?q=aktuale&mrt=en-us&FORM=LIVSOP> - 94 fojojn (serĉilo)
- [http://www.lernu.net/kursoj/kk\\_zam/postvortoj.php](http://www.lernu.net/kursoj/kk_zam/postvortoj.php) – 93 fojojn (*lernu!*)
- <http://www.tejo.org/node/9> – 81 fojojn (TA-priskribo ĉe tejo.org)
- <http://esperanto.memlink.ca/> - 78 fojojn
- <http://tejo.org/t-a> – 66 fojojn

## TEJO tutmonde

raportas Szabolcs Szilva, redaktoro de TEJO tutmonde

Mi estis nur kontribuanto por *TEJO tutmonde* (TT) inter julio 2011 kaj januaro 2012. Mi kontribuis aŭ kontribuigis al TT ekde la redaktoreco de Daniel Mrázek (Dan). En ĉi tiu periodo mi peris aŭ verkis la jenajn tesktojn, kiuj aperis ankaŭ en la reta blogo de TT:

- Smidéliusz, Petra: *15 faktoj kiujn vi certe ne sciis pri Hungario*, en *Kontakto*, nr-o 243 (2011:3)
- Szilva, Szabolcs: *Por junuloj, kiuj volas profesiiĝi pri esperantologio*, en *Kontakto*, nr-o 243 (2011:3)
- Szilva, Szabolcs: *Lingvokurso en Varsovio*, en *Kontakto*, nr-o 246 (2011:6)
- Szilva, Szabolcs: *Eklaboro en la Centro por Esperanto kaj Interkulturo*, en *Kontakto*, nr-o 247 (2012:1)

Mi volas emfazi, ke mi ekfunkciis kiel redaktoro nur post la 10-a de februaro 2012, tiel la unuaj numeroj aperintaj sub mia respondeco estis en la aprila numero de la revuo *Esperanto* kaj en *Kontakto*, nr-o 248 (2012:2). Sube vi povas legi la datumojn de la artikoloj verkitaj kaj peritaj de mi por TT.

Por bone plani la laboron multe helpis al mi miaj antaŭaj spertoj pri TT, kaj la interna pritakso de TT preparita en novembro 2011 fare de la Estraro de TEJO. Ĉi tie mi listigas la problemojn antaŭe menciitajn kaj la solvojn trovitajn kaj ekzistajn de mi.

Estis rekonita kiel problemo tio, ke en TT ne estas klare kiu artikolo iras al la revuo *Esperanto*, kiu al *Kontakto*, kaj kiu al la blogo.

Dum la redaktoreco de Daniel Mrázek ne konstante aperadis artikoloj de TT en la revuo *Esperanto*. Tion mi solvis tiel, ke mi interkonsentis kun Stano Marček – la ĉefredaktoro de la revuo *Esperanto* – pri tio, ke konstanta rubriko aperu en ĝi, kiu nomiĝu *TEJO tutmonde*. Mi certigis lin pri tio, ke mi ĉiam sendos kontribuojn ĝis la koncerna limdato kaj mi petis lin rezervi lokon por ĉiu numero. Ekde tiam, tio ĝis nun tiel okazas.

Al la revuo *Esperanto* mi enigas artikolojn, kiuj estas la plej gravaj el la vidpunkto de la malpli junaj abonantoj de la revuo *Esperanto*. Ĉi tion mi ankaŭ planas tiel daŭrigi estontece. En la septembra numero mi planas aperigi raporton pri la hanoja IJK.

Al *Kontakto*, ankaŭ laŭ la antaŭaj planoj, mi enigas artikolojn iom malpli gravajn por la tuta movado, sed tiom pli signifajn por la junularo: raportojn pri malpli gravaj eventoj, pri elstaraj, sekvindaj junularaj agadoj por Esperanto, informojn pri ebloj por junuloj por vojaĝoj, volontulado, studebloj ktp. Laŭ la antaŭa interkonsento kun Łukasz Żebrowski aperadas en ĉiu numero *Rubriko de la prezidanto*, kiu enhavas raporton de la prezidanto de TEJO por ĝia membraro pri la ĉefaj novaĵoj. Mi planas sekvi en la estonteco ĉi tiun skemon.

En la blogo de TT, laŭ la konkludoj de la interna pritakso, mi decidis ne plu duoble aperigi artikolojn, kaj enmeti en TT tiujn, kiuj tuj bezonas publikigon, ne estas loko por ili en la revuoj aŭ ili estas mallongaj. Tiel ni povis eviti ankaŭ tion, ke reklamo de iu okazonta aranĝo aperu en la paperaj revuoj nur post ĝia finiĝo. Dume mi ekhavis ankaŭ aldonan ideon pri ĝi: mi ne nur tiajn kontribuojn aperigas tie, kiujn mi ĵus priskribis, sed ankaŭ tiujn, kiuj kompletigas tiujn aperintajn en la revuoj. Kiam en la revuoj ne estas sufiĉa loko, ekzemple por tuta intervjuo, mi simple la pli urĝe publikigindajn partojn aŭ la malpli gravajn uzis en la blogo, kiel kompletigojn de la revuaj intervjuoj. En la revuoj mi atentigis la legantojn viziti la blogon por pli da detaloj aŭ por alia signife rilatanta verkaĵo tie. Vidu ekzemple la intervjuon kun Manuela Ronco, kun kiu rete aperis intervju-parto dum la serĉado de la nova volontulo de TEJO pri ŝia eksa volontulado kaj en la nuna *Kontakto* la dua parto de la intervjuo, kiu enhavas la partojn rilatantajn al konstantaĵoj, kadre de la sama temo la laboron de la salajrata oficisto de TEJO. Dum IJK mi planas en la blogo aperigi ĉiutagan informilon, pretigitan de la partoprenantoj de la kongreso.

Estas unu afero pri kiu mi certe ne povas plenumi la dezirojn de la Estraro de TEJO: havi spitajn, kritikajn artikolojn en TT simple ne eblas ekhavi de la kontribuantoj.

Jen la artikoloj aperintaj dum mia redaktorado en la koncerna tempoperiodo:

En la revuo *Esperanto*:

- Bagó, Sarolta (2012): *Elektado de Komitatanoj B de TEJO*, en *Esperanto*, nr-o 1257 (4), aprilo, 2012
- Motta, Alvaro; Szilva, Szabolcs (2012): *Ĉu voĉdoni por Esperanto en RIO+20?* [malpli longa versio], en *Esperanto*, nr-o 1258 (5), majo, 2012

- Bagó, Sarolta (2012): *Komencanto-spertoj de denaskulo* (KER-raporto), en *Esperanto*, nr-o 1259 (6), junio, 2012

En la revuo *Kontakto*:

- Szilva, Szabolcs (2012): *Enkonduke*, en *Kontakto*, nr-o 248 (2012:2)
- Murr, Saša: *Nordluma renontiĝo en Norda Norvegio*; en *Kontakto*, nr-o 248 (2012:2)
- Żebrowski, Łukasz: *Prezidanta rubriko*; en *Kontakto*, nr-o 248 (2012:2)
- Huurman, Nico: *TEJO/UEA aktive reprezentita ĉe la Junulara Forumo de Unesko*; en *Kontakto*, nr-o 248 (2012:2)
- Kaźmierski, Tobiasz: *Froste kaj toste, sed antaŭ ĉio lingvistike en Poznan*; en *Kontakto*, nr-o 248 (2012:2)
- Żebrowski, Łukasz: *Rubriko de la prezidanto*; en *Kontakto*, nr-o 249 (2012:3)
- Kumar, Kotha Naga Siva: *Esperanto estu pontlingvo inter ĉiuj sudazianoj*; en *Kontakto*, nr-o 249 (2012:3)
- Tiĥomirov, Konstantin: *Sekvinda agado: la leviĝanta „Aŭroro”*; en *Kontakto*, nr-o 249 (2012:3)
- Ronco, Manuela; Szilva, Szabolcs: *Esti salajrata oficisto de TEJO*; en *Kontakto*, nr-o 249 (2012:3)

En la blogo:

- Antolak, Natalia (2012): *La unuaj vortoj de la nova volontulo*, <http://tejo.org/eo/node/1424>
- Motta, Alvaro; Szilva, Szabolcs (2012): *Ĉu voĉdoni por Esperanto en RIO+20?* [kompleta versio], <http://tejo.org/eo/node/1441>
- Ronco, Manuela; Szilva, Szabolcs (2012): *Estu vi la sekva volontulo de TEJO! – Intervjuo kun Manuela Ronco*, <http://tejo.org/eo/node/1444>

## Kontakto

raportas Rogener Pavinski, redaktoro de *Kontakto*

La jaro 2011 estis la unua plena jaro, en kiu la ses numeroj de *Kontakto* estis sub mia respondeco.

La revuo spertis plenan grafikan renoviĝon kaj enhavan plivigliĝon. La paĝo-nombro kreskis de 16 en 2010 al 24 en 2011, el kiuj kvar estas dediĉitaj al la nova rubriko *TEJO tutmonde* kaj ok estas koloraj paĝoj. La renovigo sukcesis plenumi la dezirojn de la Estraro de TEJO, kiam ĝi decidis serĉi novan redaktoron cele al pli interesa, pli enhavplena kaj pli akurata revuo.

La revuo jam en la unua eldono de 2011 aperis kun tute nova aspekto kaj refreŝigita enhavo. Ĝi ankaŭ ŝanĝis la mezurojn de paĝoj (revenis al la klasika grandeco de la 1990-aj jaroj). Kreiĝis novaj rubrikoj, kiel la sukcesaj “La Blaga Blogo” de Victor Solé, “Tiel la mondo” de István Ertl, “El Ĉinio” kaj aliaj. Daŭre aperadas la rubrikoj “Facila”, “Recenzo” kaj “TEJO tutmonde”. Novaj kaj konstantaj kunlaborantoj aperas, kiel ekz.: Aleksander Osincev, Olga Ŝilajeva, Gregory Naçu, Sergio Tyrin, Rafael Zerbetto kaj aliaj.

La rubriko “Intervjuo” fariĝis konstanta kaj ĉiam prezentas interesan personon, ligitan iamaniere al Esperanto.

De 2011 la intervjuitoj estis: Simmon K. Barney, Patrik Austin, Sam Green, Irek Bobrzak, Ĵak Le Puil kaj Nanne Kalma. Ĝis nun en 2012 estis intervjuitaj Kalle Kniivilä, Agenita Ameno kaj Jorge Camacho.

En 2011 la abonoj de la revuo *Kontakto* kreskis je 9,3% per pliaj 56 abonoj kaj komence de 2012, kadre de la membrokampanjo de TEJO, la revuo *Kontakto* kolektis 104 novajn abonojn dum la unuaj 3 monatoj de 2012. Tiuj kiuj aliĝis al TEJO aŭ individue abonis *Kontakton*, ricevis T-ĉemizon. Aldone al tio, Esperanto-Asocio de San-Paŭlo pere de sukcesa aliĝo-kampanjo ĝuis la 40%-an rabaton por komunaj abonoj kaj kolektis 40 abonojn, per kiuj ĝi regalis la fruajn aliĝintojn por la jaro 2012.

Samtempe kun apero de la duobla eldono 2010:5-6, lanĉiĝis en interreto la retejo de *Kontakto* (kontakto.tejo.org) kaj profiloj en sociaj retoj kiel Twitter, Facebook kaj Ipernity, kiuj modernigis kaj plifaciligis kontakton kun legantoj kaj kontribuantoj. Dum 2011 kaj 2012 la agado ĉe interreto daŭre kreskis. Iloj kiel enketoj estis uzitaj por scii la opiniojn de la legantoj pri kelkaj aspektoj de iliaj rilatoj kun la revuo kaj eĉ legantoj mem povis decidi pri la kovrilo de la eldono 2012:1, per sociaj retoj.

Kostanta agado dum la jaro 2011 estis la premio por kontribuantoj. Partnerece kun la muzik-eldonejo Vinilkosmo, la revuo *Kontakto* disdonis 9 mp3-formajn albumojn, po 3 "Hiphopa Kompilo" Volumo 2, "Urbano" de Inicialoj DC kaj "Trajn' Nenien" de Dolchamar.

Por la restanta parto de la jaro 2012 ni daŭrigos nian laboron, esperante pri la daŭra kresko de legantoj kaj kontribuantoj. En 2013 la revuo *Kontakto* fariĝos 50-jara. Estas planataj multaj novaĵoj por festi tiun jubileon, kiel pliigo de koloraj paĝoj kaj kulturo-rilataj konkursoj.

## Mallongigoj

Jen la listo de la mallongigoj kaj akronimoj uzataj en la raporto kun iliaj respektivaj signifoj.

AEGEE	Eŭropa Studenta Forumo
BEJO	Brazila Esperantista Junulara Organizo
EU	Eŭropa Unio
EVU	Eŭropa Vegetara Unuiĝo
FOJE	Forumo Junulara Eŭropa
GCCA	Tutmonda Kampanjo por Klimata Ago
GEJ	Germana Esperanto-Junularo
ICMYO	Internacia Kunordig-Renkontiĝo de Junularaj Organizoj
IJK	Internacia Junulara Kongreso
ILEI	Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
JELI	Junulara Esperanto-Ligo Israela
JES	Junulara E-Semajno
KER	Komisiono pri Eksteraj Rilatoj / Komuna Eŭropa Referenckadro
KODEJO	Kompleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizoj
LKK	Landa Kongresa Komitato
LS	Landa sekcio
MEA	Meksika Esperanto-Asocio
NRO	Ne-registara Organizo
OEKE	Organizo por la Ekonomia Kunlaboro kaj Evoluo

TA	TEJO-aktuale
TEJO	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
TEVA	Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio
TT	TEJO tutmonde
UEA	Universala Esperanto-Asocio
UK	Universala Kongreso de Esperanto
UN	Unuiĝintaj Nacioj